PS: sur la foto, de maldekstre al dekstre, *Michel Dourson* "Forum des Citoyens", *Bruno Henry* "Esperanto - Thionville", *Mikaelo Bronstejn*... la "Bardo".

*Bruno HENRY*

Bruno HENRY, 8 rue Pasteur - 57240 NILVANGE - Tel. : +33 (0)3 82 53 25 47 - [bruno\\_henry@laposte.net](mailto:bruno_henry@laposte.net)  
ESPERANTO-THONVILLE - <http://www.esperanto-thionville.fr>. St

## SAULXURES-sur-MOSELOTTE

Sub la subskribo de Ginette MARTIN jus aperis „*Journal de nuit*“ kun subtitolo *“Témoignage de femme dans la Croatie en guerre”*, traduko en franca lingvo far Ginette de la originala verko de Spomenka Stimec, „*Kroata milita noklibro*“.

En iom pli ol 100 paĝoj Spomenka rakontas neimageblajn travivaĵojn de juna virino dum la aludita konflikto. Ginette Martin proponas al la franclingvanoj menstrafan tekston, kiu „pensigos“ la leganton.

Tuj post la apero de tiu traduko, Ginette estis intervjuita de regionaj radioj -unu hora pridemandado en la unua, duonhoro en la dua- kaj aperis paralele gazetartikoloj... Jen unika okazo por elmontri la kulturan flankon de la internacia lingvo ĉe publiko foje misinformita aŭ skeptika. La libro komencas „vojaĝi“ eksterlanden, eĉ al Japanio!

Ginette klarigas: "... Mi estis helpata de kelkaj Eo-parolantoj kaj de Spomenka mem, kiuj donis al mi kelkajn precizigojn kaj kuraĝigis min. La laboro postulis pli ol du jarojn... La libron mi presigis per mia propra mono kaj nun ĝi estas aĉetebla ĉe la libro-servoj de Esperanto France-Est, UEA, SAT-Amikaro kaj Espéranto-France... kaj ankaŭ ĉe mi kompreneble (12 €). Mi insistas, por ke vi aĉetu tiun francan version por la ne-esperantista publiko -tiucele mi tradukis ĝin- sed mi plue insistas, por

ke vi ne forgesu havigi al vi la tre emociigan originalon en esperanto. Tiu verko estas ne nur valora dokumento pri la milito en Kroatio sed ankaù pensiga libro kaj pledo por la Paco. Ĝi restas aktuala”

Ni aldonu, ke nia samideanino gvidas kursojn kiel ĉuijare en privata, teknika kolegio kaj en Gérardmer.

*NB el la redaktejo de „La Informilo”:* Konsilinde... Pli oportune mendi la libron rekte ĉe

Ginette MARTIN 92 rue du Riant Côteau FR-88200 SAULXURES-sur-MOSELOTTE

reta kontakto: [gimavo@wanadoo.fr](mailto:gimavo@wanadoo.fr)

L'accès au public est  
situé à l'angle des rues  
Jacques Cœur et  
Cerisaie, à 2 minutes à  
pied de l'arrêt de  
métro Bastille, desservi  
par les lignes 1, 5 et 8 -  
sortie Boulevard Henri  
IV ou Boulevard  
Bourdon -



## ESPERANTO-FRANCE

4bis rue de la Cerisaie

75004 PARIS

① 01 42 78 69 86

télécopie : 01 42 78 08 47

courriel : [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

### Horaires d'accueil du public :


Lundi et mercredi : 9h / 12h – 13h30 / 19h

Mardi : 16h / 20h

Jeudi : 16h30 / 19h

Vendredi : 18h / 20h

Samedi : 9h / 12h – 13h30 / 19h



Comme prévu depuis plusieurs mois, la composition du bureau d' Espéranto-France et la répartition des rôles au sein de celui-ci a évolué en date du 1er octobre 2004 :

Président :	Claude LONGUE-EPEE (dont relations extérieures)
Vice-président :	François BARTSCH (information)
Vice-président :	Xavier GODIVIER (développement local et régional)
Secrétaire Général :	Vincent CHARLOT - en remplacement de Jérôme Mathieu
Trésorier :	Alain FAGOT - en remplacement de Jean-Louis Texier
Membre :	Claude NOURMONT (culture et revues)
Membre :	Jean-Louis TEXIER



## FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO



FEI estas instituto komuna al Esperanto-France kaj SAT-Amikaro pri organizo de ekzamenoj en Francio kaj disdono de diplomoj. Ĝi ankaù kontolas la manuskriptoj de lernolibroj aù literaturajoj, kondicē, ke gi estu petita.

Elektiĝis nova teamo, kiun prezidas Michel DUC-GONINAZ. Ĝi celas akceli la instruadon de esperanto en Francio kaj provizi la kursgvidantojn per taûgaj informoj prei ekzamenoj. Ĉicele, gi nun havas TIT-ejon, kium zorgas Serge

SIRE : <http://fei.chez.tiscal.fr>

Sekve bonvolu sendi al tiu adreso ĉiujn informojn pri staĝoj de Esperanto, semajnfinaj kursoj, dato de ekzamenoj ( nenio malhelpas homon el Avignon trapasi ekzamenon en Liono! ).

Informu ankaù la sekretarion: Renée TRIOLLE, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, 13600 LA CIOTAT aù enkaze de urĝeco ( sed ĝi malbone funkcijs ) [triolle.renee@wanadoo.fr](mailto:triolle.renee@wanadoo.fr).

Rilate la ekzamenojn, bonvolu vin turni al la nuna direktoro de la ekzamenoj : Gaston RISTE, 57 avenue de St-Donat, 26100 ROMANS, tel. 04 75 02 01 07 aù [gaston.riste@laposte.net](mailto:gaston.riste@laposte.net).


La FEI-anoj estis elektitaj ĝis 2007. Vic-prezidanto restas Claude ROUX, kasisto Thérèse PINET kaj sekretario de la ekzamenoj Suzanne BOUROT.



## Rekte el la UEA-sidejo...

GAZETARA KOMUNIKO N-ro 188 = 2004-11-30

**"MALFERMA TAGO"** ripetis rekordon kaj faris novan!...



De ses jaroj la **Centra Oficejo de UEA** ne estis tiel homplena kiel en la 21-a Malferma Tago, sabaton, la 27-an de novembro, kiam ĉ. 150 esperantistoj el 18 landoj vizitis sian domon en Roterdamo. Tio egalas la rekordon el novembro 1998, sed ĉi-foje la vizitantoj estis pli acetemaj ol tiem. La antaŭa vendorekordo estis 4961 eŭroj, sed kvazaŭ por festi la 10-jariĝon de la tradicio de Malfermaj Tagoj, la Libroservo de UEA povis registri novan rekordon de 5262 eŭroj.

La programo de la "Tago" estis aparte riĉa kaj kulminis en mallonga ceremonio, dum kiu prezidanto **Renato Corsetti**



transdonis la Premion "*Onisaburo Deguchi*" al **Marjorie Boulton**. Tiu ĉi plej grava premio de UEA rekonas longdaŭran agadon por internacia amikeco kaj paco pere de Esperanto. Gia ĉi-jara ricevanto estis anoncita en la UK en Pekino, sed ĉar Marjorie Boulton ne povis ĉeesti tie, la transdono de la Premio okazis en la Malferma Tago. Post la premiado la laŭreatino faris impresan prelegon kun la temo "*Tra Lumo kaj Mallumo: kelkaj memoroj de veteranino*". UEA eldonos ĝin en formo de ilustrita libreto.

Estrarano **Claude Nourmont** enkondukis omaĝon al **Luiza Marin**, al kiu *Unuiĝo Franca por Esperanto* donacis partoprenon en la Malferma Tago por danki ŝin pro preskaŭ 27-jara dekorado en la oficejo de UFE. Generala Direktoro **Osmo Buller** laŭdis la agadon de s-ino Marin kiel modela ĉefdelegito kaj peranto, kaj **Atie van Zeist**, sekretariino de la CO, transdonis al ŝi rozon kiel simbolon de la dankemo de la Roterdama stabo pro bona kunlaboro tra la jaroj.

Pluraj novaj originalaj Esperanto-verkoj estis prezентitaj. La plej freŝa estis la romano "*La kastelo de Vitro*" de John Francis, kiu estis unuafoje aĉetebla en la Malferma Tago. Ĝin prezantis **Francisco Veuthey**, kiu ilustris la verkon. **Jorge Camacho** prezantis siajn poemarojn "*Celakantoj*" kaj "*Saturno*", kiuj aperis ĉi-jare same kiel la romano "*Dek tagoj de kapitano Postnikov*" de **Mikaelo Bronstejn**, kies mult-talenta aŭtoro krome plezurigis la publikon per siaj kantoj. Alian muzikan kontribuon al la programo faris la kantgrupo *Akordo*, kiu prezantis ankaŭ sian kompaktan diskon "*Kristnaska kordo*" kun 25 kristnaskaj kantoj el diversaj landoj kaj kulturoj.

Fine de la posttagmezo du surprizaj aldonoj al la antaŭanonicita programo plenigis la salonoron Zamenhof. Unue **Povilas Jegorovas**, prezidanto de LKK, raportis pri la preparoj por la 90-a UK en Vilno. La LKK-prezidanto vidis sian raporton premiita per kelkaj tujaj aliigoj. La programero "*Estraranoj respondas*" donis okazon diskuti kun la ĉeestantaj estraranoj, kiuj estis entute kvar, ĉar apud Corsetti kaj Nourmont partoprenis ankaŭ **Ulla Luin** kaj **Ans Bakker-ten Hagen**, respektive generala sekretariino kaj estraranino pri financo kaj administrado. Plia agrabla surprizo estis la ebleco renkonti du membrojn de la *Esperanto-redakcio de Pola Radio*, **Barbara Pietrzak** kaj **Gabriela Kosiarska**, kiuj registris dum la Tago plurajn interjuojn por aŭdigo en proksimaj elsendoj. Al Marjorie Boulton redaktorino Pietrzak ankaŭ transdonis kiel specialan donacon de Pola Radio registraĵon de iama interjuo kun la fama verkisto.

Al la nova vendorekordo de la Libroservo precipe kontribuis kelkaj novaj titoloj. La plej furora estis la *dudirekta nederlanda vortaro*, kiu estis vendita en 29 ekzempleroj, sekvata de la nova romano de Francis (21). Aliaj furoraj estis "*Mil unuaj vortoj en Esperanto*" (14), *la Postnikov-romano* de Bronstejn (10) kaj la plej nova titolo en la Serio Oriento-Okcidento, la klasikajo "*Aventuroj de la brava soldato Švejk dum la mondumilito*" de Jaroslav Hašek (10). Inter diskoj pleje furoris la ĵus aperinta nova KD de **Kajto**, "*Lokomotivo, rulu nun!*" (14).

La vizitantoj povis konatiĝi ankaŭ kun malgranda eksposizio pri Unesko kaj UEA, kiun **Ziko Sikosek** kunmetis lige kun la 50-a datreveno de la akcepto de la Montevidea Esperanto-rezolucio de Unesco.

Jam nun, la stabo de la Centra Oficejo invitas al la 22-a Malferma Tago sabaton, la 23-an de aprilo 2005.

*Renato Corsetti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina, Italijo <renato.corsetti@virgilio.it*

Saluton!

Vi certe jam aŭdis pri la reta humur-gazeto *Vola Pug'*. Se vi ankoraŭ ne konas ĝin, iru al: [www.volapug.net](http://www.volapug.net). Multaj homoj maltrankviliĝas kaj skribas al ni: ĉu *Vola Pug'* mortas? Kiam estos nova numero? Ne timu: la numero 4 baldaŭ aperos dum la sekvaj monatoj.

Sed estas alia novajo: ni ankaŭ faros iun paperan version de *Vola Pug'*, jes, papere vi povos rekte tuŝi ĝin!!! Cetere, kvankam ni estas jam aro da geredaktantoj, ne multaj bildstrioj alvenas al nia redakcio. Kaj ni vidas tie kaj tie esperantistojn, kiuj desegnadas. Sed ofte ili ne aŭdacas kontakti *VolaPug-on* por proponi siajn desegnojn, ĉar ili pensas: tio ne estas mia stilo de komiksoj, tio ne estas mia stilo de humuro, ktp. Sed nepre ne pensu tiel: *Vola Pug'* estas malfermata al ĈIAJ specoj de humuro kaj desegnoj! Se kelkaj personoj opinias, ke la gazeto aspektas tro europeca, estas ĉar estas multaj eŭropaj redaktantoj.

[ tro! ;-) ] en la teamo, sed ni volas vere internaciigi la gazeton: do, ESPERANTISTAJ DESEGNISTOJ EL ĈIUJ KONTINENTOJ, NI BEZONAS VIN!

Se vi ŝatas desegni (aŭ se vi havas ideojn por bildstrioj kaj povus kunlabori kun iu desegnisto), ne hezitu! Por kontatti nin, unu adreso : [redaktejo@volapug.net](mailto:redaktejo@volapug.net)



Komikseme salutas,

Henrri De Sabates, ĉefredaktoro de *Vola Pug'*

CEEAC (Cercle d'Etudes Espérantistes de l'Ariège)  
Mairie - FR - 09340 VERNIOILLE

## *I3-a KORUSO-STAGO*

*en esperanto kun*

*folk-muzikaj inter' anĝoj*

**de 6-a ĝis 13-a de februaro 2005**

en Montferrier, piede de Montségur,

en Arjejaj Pireneoj



en feriejo *La Freychede* (sen-GMO-aj manĝoj)

- La **korusan laboron** ĉef-vidos juna  
dana korusestro **Jesper JACOBSEN**,  
helpata por partaj trejnadoj de aliaj E-(kaj neE)-lingvaj  
korusestroj, jam antauvidas sian partoprenon

*Franjo PROVOST* el Bretonio,

*jaklin' SCHMITTER* el Elzaco,

*Bernard DOUCELIN* el Limogio,

- **Plurvoĉaj kantoj** el diversaj tempoj kaj  
teritorioj (plej grave Romantikaj/Renesancaj)

- Pro lastajar sperto pluraj partoprenantoj alportos  
sian muzikinstrumentojn por ankau **folk-**

**ludadi** kun lokaj spertuloj *Gérard GARRIGUES*  
kaj *Patrick TERRIS*.

- Eblo komencantoj en E° aŭ akompanantoj de  
koruso krome petos **E-kurson** ...

**Programo :** ĉiutage 5 horoj da kanto-trejnado,  
kultura/turismaj vizitoj, pied-kaj ski-ekskursoj,  
kaj vespero: ludoj, debatoj aŭ video-spektado, ktp.

**Akcepto:** ekde dimanĉo 6-a de februaro je la 15-a.

**Stag-eko:** lunden 7-an de februaro je la 8-a horo 45.

**Stag-fino:** dimanĉon 13-an de februaro je la 15-a.

**Aliĝo-kondiĉoj:**

**CEEA-anĝo** (pri asocioj aseturoj kaj pro kiu vi ricevos  
trimonatan bulteron « ESPERANTO PYRENEES »)

normale: 16 Euroj rabatite: 11 Euroj

paro: 24 Euroj infanoj (>16-jaraj): 5 Euroj

**Euskrribigo por la semajno:** malplikoste se  
fui aŭ/kaj se junage aŭ/kaj se plurope el sana familio  
/ / soprano, / /aldino, / /tenoro, / /baso;  
komencanto / kantademo / kapabla legi partiturojn  
(jes / ne) kaj deziras tiujn anticipi ricevi (jes / ne)  
/ / folk-muzikanto kaj mi ludas ..... "on  
/ / E° komencanto kaj deziras E-kurson (jes / ne)

Mi partoprenos la stagon, kiel,  
/ / akompananto (jes/ne) - / / koruso (jes/ne)  
(ĉoko por CEEA - CCP n°257934E Toulouse) pri:  
1) Anĝo ce CEEA (devige) ..... E

2) Enskribiĝo je l'stago ..... E

3) Restado (kosto) ..... E, antaŭpago 10 % ..... E

4) Donaco (lauvoles) ..... E

5) Sumo ..... (hodiau pagata) ..... E

6) Pagota je alveno ..... E  
Repageblos nur enskribiĝ-kostoj ĝis 5-a de januaro  
kaj restad-kostoj ĝis 5-a de februaro.

Rimarko: akompanantoj, kiuj restadas sed ne stagumas  
ne pagos enskribiĝon.

**Restad-kostoj:**

7 x 24 horoj (nokto + 3 manĝoj):	200 Euroj
Sen Tag-Mangoj:	170 Euroj
Aliaj eblecoj:	petu apartan tarifon

**ALIĜILO** vok-Nomo  
Familia Nomo.....

Adreso.....

Land- & pošt-kodoj.....

Urbo.....

Tel-n° ..... @dreso.....

Land- & pošt-kodoj.....

Urbo.....

Ĉian sendaĵon al : JORGOS FR - 11420 LAFAGE  
(tel: 33 0 468 605 417) @dreso : jorgos@iscali.fr

Viaj ideoj, proponoj, petoj .....

(dankon !)

**Vous invitent au****57<sup>ème</sup> Stage Régional d'Espéranto**

espéranto

France-Est

**Invitas vin al la****57a Regiona Staĝo de Esperanto**

La 15 - 16 - 17-ajn de aprilo 2005  
en Lucelle en la sudo de Alzaco  
ĉe la svisa landlimo

Les 15 - 16 - 17 avril 2005  
à Lucelle dans le sud de l'Alsace  
près de la frontière suisse



**Koncerto de  
JoMo****Riĉa programo  
kun****Prelegoj de  
Ed. Borsboom**

*JoMo estas konata kantisto, kiu per sia gitaro kaj sia agrabla voĉo sukcesas kapti la atenton de la spektantoj. Liaj kantoj kvazaŭ lude saltas de lingvo al lingvo surprizante la aŭskultantojn. En lia repertuaro kantoj en pli ol 20 lingvoj por la plezuro de la ĉeestantoj.*

La vilaĝo Lucelle troviĝas grand-partie en Svislando, malgranda parto inkluzive de la domo Saint-Bernard, nia staĝejo, troviĝas en Francio. Por pli facile atingi Lucelle ekde Altkirch, prefere traveturu la vilaĝojn Feldbach, Moernach, Durlingsdorf, Winkel ĝis Lucelle. Sur la apuda mapo eblas vidi, ke la strato al la staĝejo trairas iom Svislandon. Tamen la svisa doganejo troviĝas nur poste direkte al Délémont.

Le village de Lucelle se trouve en grande partie en Suisse, une petite partie se trouve en France y compris la maison Saint-Bernard où aura lieu notre stage. Pour atteindre plus facilement Lucelle, utiliser de préférence l'itinéraire suivant à partir d'Altkirch: par les villages Feldbach, Moernach, Durlingsdorf, Winkel jusqu'à Lucelle.

Sur la carte de gauche on peut remarquer que pour atteindre la Maison Saint-Bernard il est nécessaire de traverser un peu la Suisse. Mais il faut laisser le poste de douane à votre droite.



# 57<sup>ème</sup> Stage Régional d'Espéranto

organisé par



esperanto

France-Est

Vendredi le 15, samedi le 16 et dimanche le 17 avril 2005  
 à Lucelle au sud de l'Alsace à la frontière suisse.  
 Centre Européen de rencontres - Maison Saint-Bernard

## Programme provisoire

### Vendredi le 15 avril 2005

- 17h Accueil
- 19h Dîner
- 20h30 Diaporama du Congrès d'Esperanto 2004 à Pékin et de l'après-congrès.
- 21h30 Bienvenue! Rencontres.

### Samedi le 16 avril 2005

- 8h Petit déjeuner
- 9h30 11h30 Visite du musée paysan de Oltingue.
- 12h-13a Déjeuner
- 13h Au choix, promenade digestive.
- 13h-14h30 Accueil de stagiaires.
- 14h30 - 18a30 Cours et conférences
- 16a30 - 17h Pause café
- 19h Dîner
- 20h30 – 22h Concert de JoMo en Esperanto et autres langues.  
 (dans la salle à côté du restaurant)

### Dimanche le 17 avril 2005

- 8h-9h Petit déjeuner
- 9h-11h30 Cours et conférences
- 12h-13h Déjeuner
- 14h-16h Assemblée Générale de Esperanto France-Est
- 14a Visite du lieu de pèlerinage de Marienstein en Suisse.
- 17h Fermeture du service Librairie

Adhésion et séjour	prix en euros
Adhérent principal, pour les abonnés à "La Informilo" et pour les étrangers.	25 €
Adhérent principal avec abonnement à "La Informilo" pour les non abonnés	37 €
Autre adhérent (à la même adresse)	20 €
Adhésion enfants et étudiants	1 €
Pension complète pour 1 personne pour enfant 5 à 15 ans	45 € 16 €
Demi-pension pour 1 personne pour enfant 5 à 15 ans	41 € 12 €
Supplément pour chambre individuelle pour 1 ou 2 nuitées	12 €
Repas supplémentaire sans nuité	9,50 €

La pension complète comprend une nuité, 3 repas avec boisson et un café au déjeuner

Veuillez retourner votre adhésion et votre paiement à:  
 (au minimum l'adhésion)  
**S-ro André Grossmann**  
 5, rue des Pyrénées  
 68390 BALDERSHEIM Francio  
 Chèque ou virement au nom de:  
 Mulhouse-Esperanto  
 CCP 19 684 F Strasbourg  
 Virement international:  
 IBAN: FR24 2004 10101500  
 1968 4F03 617  
 BIC: PSSTFRPPSTR

### Cours

- A. pour débutants:**  
 Ginette Martin apportera le matériel adéquat.
- B. pour progresser:**  
 Familiarisons-nous avec les règles de l'espéranto en bavardant avec Roberto Kueny.
- C. conversation** animée par Edmond Ludwig avec matériel spécifique.

Nombre de repas ou de nuitées	Vendredi	Samedi	Dimanche
Déjeuner			
Dîner			
Nuité + petit déjeuner			
Chambre Individuelle			

Préférences	Chaque chambre avec douche et WC
	Chambre avec grand lit (pour couple ou pour chambre individuelle)
	Chambre avec 2 lits
	Chambre avec grand lit (pour couple)
	Chambre avec 2 lits et lit supplémentaire pour enfant

## Adhésion et réservation pour le 57<sup>ème</sup> Stage Régional d'Espéranto à Lucelle

M. Mme	Nom de famille	Prénom	Adhésion	Cours choisi
1				
2				
3				

Adresse

Téléphone: \_\_\_\_\_ Courriel: \_\_\_\_\_

Je désire participer à la visite du musée paysan à Oltingue   
 à la visite du lieu de pèlerinage de Marienstein en Suisse

Je verse à Mulhouse-Esperanto la somme de:

# 57a Regiona Stago de Esperanto

organizita de



esperanto

France-Est

Vendrede la 15an, sabate la 16an kaj dimanĉe la 17an de aprilo 2005  
 en Lucelle en la sudo de Alzaco ĉe la svisa landlimo  
 Centre Européen de rencontres - Maison Saint-Bernard

## Provizora Programo

### Vendrede 15an de aprilo 2005

- 17h Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 19h Vespermanĝo
- 20h30 Prezentado de fotoj pri Ĉinio (UK kaj postkongreso al Urumqi).
- 21a30 Bonveno, konatiĝo.

### Sabate 16an de aprilo 2005

- 8a Matenmanĝo
- 9a30 - 11a30 Vizito al kamparana muzeo en la vilaĝo Oltingue.
- 12a-13a Tagmanĝo
- 13a Laŭ deziro, digesta promenado
- 13a-14a30 Akcepto de staĝanoj
- 14a30 - 18a30 Kursoj kaj prelegoj
- 16a30 - 17a Kafopaŭzo.
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 – 22a Koncerto de JoMo en Esperanto kaj en aliaj lingvoj.  
 (en salono apud la restoracio)

### Dimanĉe 17an de aprilo 2005

- 8a - 9a Matenmanĝo
- 9a -11a30 Kursoj kaj prelegoj
- 12a -13a Tagmanĝo
- 14a -16a Ĝenerala asembleo de Esperanto France-Est
- 14a Vizito al pilgrimejo Marienstein en Svislando
- 17a Fermo de la libroservo.

Aliĝoj kaj restado	kosto en eŭroj
Ĉef-aliganto jam abonanto al "La Informilo" kaj por eksterlandanoj	25 €
Ĉef-aliganto kun abon-pago al "La Informilo" (por ne abonantoj)	37 €
Kun-aliganto (sama adreso kiel ĉef-aliganto)	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	1 €
Kompleta pensiono por 1 persono por infano 5 ĝis 15-jara	45 € 16 €
Duon-pensiono por 1 persono por infano 5 ĝis 15-jara	41 € 12 €
Suplemento por individua ĉambro por 1 aŭ 2 tranoktoj	12 €
Kroma manĝo sen tranokto	9,50 €

Kompleta pensiono inkluzivas unu tranokton, 3 manĝojn kun trinkajo kaj kafon kun la tagmanĝo.

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al:  
 (minimume la aliĝkotizon)  
**S-ro André Grossmann**  
 5, rue des Pyrénées  
 68390 BALDERSHEIM Francio  
 Ĉekoj aŭ ĝiroj je la nomo de:  
 Mulhouse-Esperanto  
 CCP 19 684 F Strasbourg  
 Internacia ĝiro:  
 IBAN: FR24 2004 10101500 1968  
 4F03 617  
 BIC: PSSTFRPPSTR

**Kursoj**  
 A. **por komencantoj:**  
 Ginette Martin alportos specifan materialon.  
 B. **por progresantoj:**  
 Ni amikiĝu kun la Esperanto-regulo babilante kun Roberto Kueny.  
 C. **konversacio** vigiligata de Edmond Ludwig kun specifa materialo.  
 D. **Prelego**  
 Ed Borsboom prelegos pri cent jaroj de rusaj Esperanto-verkistoj. De Ŝirjaev ĝis Bronstein. Eksterteme pri la biografio *Viva de Andreo Cseh*.—

## Aliĝilo kaj rezervado por la 57a Regiona Stago de Esperanto en Lucelle

Nombro da manĝoj aŭ tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tag-manĝo			
Vesper-manĝo			
Tranoktado + Maten-manĝo			
Individua ĉambro			
Mia prefero	Ĉiu ĉambroj kun dušoj kaj necesejoj		
	Ĉambro kun granda lito por paro aŭ por individua ĉambro		
	Ĉambro kun 2 litoj		
	Ĉambro kun granda lito (por paro) kaj kro- ma lito por infano		
	Ĉambro kun 2 litoj kaj kroma lito por infano		
Adreso			
Telefono:	Ret-adreso:		
Mi (ni) deziras partopreni la proponitajn vizitojn al Kamparana muzeo en Oltingue : <input type="checkbox"/> Pilgrimejo en Marienstein Svislando: <input type="checkbox"/>			
Mi antaŭpagas jenan sumon al Mulhouse-Esperanto:			

# Post-kongreso en Ĉinio

La ĉi-jara Universala kongreso okazis kun granda sukceso en Pekino. Ĝi estis vere mirinda kaj bone organizita. Diversaj post-kongresoj estis proponitaj al la kongresanoj por konatiĝi kun la vasta lando Ĉinio. La postkongreso "Silka Vojo" allogis 60 kongresanojn. La unuan de aŭgusto ni flugis de Pekino al Xi'an (sian). Tiu urbo estas fame-konata pro la tera-kotaj militistoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (antaŭ pli ol 2000 jaroj). Ili fakte estis malkovritaj de kamparano nur en la lasta jarcento. Vera m-

Ĉe vendejo oni montris al ni, kiel oni muldas kaj pretigas miniaturajn soldatojn. Krome en la vendejo abundis multaj artaĵoj, kiujn oni proposis al la turistoj.

Vespere en restoracio ni ĝuis agrablan mildan muzikon dum la manĝo. Poste komenciĝis vera spektaklo kun muzikistoj kaj gedancistoj en multkoloraj vestaĵoj. Ili dancoj montris diversajn rakontojn de la ĉina historio.

en Xi'an



Entute troviĝas 6000 tiaj argilaj statuoj sub la tero. 1000 estas jam trovitaj. La militistoj estas alt-staturaj je 1,80 m.

Tri haloj estas viziteblaj. En la du unuaj estas videblaj la fositaj lokoj, la statuo-riparejo, ĉevaloj. En la lasta halo oni vidas la soldatojn vice starantaj.



De Xi'an ni flugis pli okcidenten al Dunhuanc. Ni vizitis tie Mogao-kavernaron kun miloj da Budaoj de la 12a jarcento. Bedaŭrinde oni de rajtis foti interne. En iuj kavernoj troviĝis ankaŭ grandaj budaoj, sidantaj kaj kušantaj.

En tapiŝo-vendejo oni vendis tre belajn silkajn tapiŝojn, kiuj postulas plurajn monatojn da laboro. Krome aĉetebolis tie diversaj bidloj kaj multe da aliaj memorajoj.

en Dunhuanc



Parto de la Mogao-kavernaro



Ĉarmaj dancistinoj regalis la spektantojn per multkoloraj vestaĵoj




La regiono estis jam pli dezerta, aparte interesa estis la Sonanta Sablo-monto. De la parkejo eblis ĝin atingi piede (15 mn) per kamelo aŭ aŭtobuse. Tiel nia grupo dividigis en 3 partoj. Multaj poste grimpis la monton dank'al lignaj ŝtuparoj metita sur la sablo. De supre oni ĝuis agrablan panoramon, jes multe da sablo, sed jen en malgranda oazo troviĝis la duon-luna lageto kaj apude iama templo. (Nun ĝi estas kiosko).

Per lignaj sledoj oni facile povis malsuprenigiti. Laŭdire, se plurope oni tiel malsuprenigitas, oni povas audi vibradon, pro tio ĝi nomiĝas la Sonanta Sablo-monto.

Taŭga transportilo en la dezerto: La kameloj ĉe la sablo-monto



## Apud Dunhuan



Ĉarma duonluna lageto ĉirkaŭata de multe da sablo.



Sekigitaj vinberoj estas specialaĵo en Ujgurio

En Ujgurio oni produktas multe da vinberoj. Unu triono estas uzata por fari vinon, alia triono por produkti sekigitajn vinberojn kaj la cetero estas vendata kiel manĝeblaj vinberoj. Ankaŭ nia grupo vizitis tian vitejon kaj gustumis diversajn vinberojn. Sur la flamanta monto troviĝas aliaj kavernaroj kun multaj budaoj, pluraj el ili estis difektitaj. Meze en la dezerto gura lingvoj troviĝas ruinoj de malnova urbo de la 7a jarcento. En muzeo oni klarigis, kiel antau 2000 jaroj oni sukcesis fari akvo-tuneloj por transporti la montaran akvon al la valo.



## Apud Turpan

Aŭtobuse tra dezerto sed sur bonaj ŝoseoj ni atingis la ĉef-urbon de Ujgurio Urumqi (urumĉi). Ĝi estas tre moderna urbo, tie loĝas 80% da ĉinoj, sed en ceteraj partoj de Ujgurio nur 20%. Sur montaro ni vizitis jurtojn de tataroj kaj montaran lageton. Nia turismado estis vere tre varia. En ĉiu urbo ni loĝis en komfortaj hoteloj. La 8an de aŭgusto ni re-flugis al Pekino, kie finiĝis la postkongreso.

Sur montaro, jurto de la tatara minoritato



## Ĉirkaŭ Unrumqi



Survoje al montara lago, vendistoj proponas fruktojn.

# Sur la montaro Jacugatake en Japanio troviĝas Esperanto-Domo administrata de Japana Esperanto-Instituto.



La Esperanto-Domo en la regiono de Jacugatake-montaro povas akcepti ĝis 20 gastojn en komfortaj du- aŭ 3-litaj ĉambroj aŭ en pligranda tatamio-ĉambro. Tie okazas diversaj Esperanto-aranĝoj, krome la domo ankaŭ akceptas individuajn gastojn.


De la 21a ĝis la 23a de aŭgusto okazis Esperanto-seminario nomata "Nur-Esperanto-Kunvivado", kiun partoprenis 19 personoj. S-ro Išikaŭa estis la organizanto de tiu aranĝo, kiu akceptis komencantojn kaj progresantojn kaj havis la celon, ke ĉiuj laŭ sia kapablo parolu en Esperanto. Plej multaj programeroj estis komunaj por ĉiuj partoprenantoj, sed por kelkaj programeroj oni kreis iom hazarde, (ne laŭ niveloj) 3 grupojn, kiuj aparte lernis en la domo aŭ dum promenado.

Dum la komuna programo ĉiuj partoprenantoj laŭvice prezentiĝis 10-minutan paroladon plej ofte antaŭ-preparitan. Temis fakte pri mallongaj prelegoj laŭ plej diversaj temoj. Iuj parolis pri sia hobio aŭ vojaĝoj, aliaj pri sia profesio aŭ pri sia familio aŭ pli gravaj temoj estis pri fotisto dum milito en Irako, ktp... Post la prelego, la organizanto petis sinsekve 3 partoprenantojn fari demandojn. Kaj se restis tempo eĉ pliaj demandoj estis akceptitaj. Kelkofoje tio kreis interesajn diskutojn.

La sama kunveno-ĉambro estis ankaŭ uzata por la diversaj manĝoj de la tago, tial necesis iom strikte respekti la horojn de la diversaj programo-partoj. Pri tio bone zorgis s-ro Išikaŭa.

En la Esperanto-domo troviĝas granda kunveno-salono kun apude malgranda kuirero. Alia salono, biblioteko kaj oficejo kun komputilo. En tuj apuda domo sur 3 etaĝoj troviĝas la dormo-ĉambroj.





S-ro Saiki rakontas al ni kiel li perdis kaj poste klopojis por retrovi sian fotilon dum la kongreso en Pekino. Li trovis la taŭgajn vortojn por priskribi siajn sentojn kaj emociojn, ĝis finfine li retrovis sian fotilon, kvazaŭ batalo, kun rezigno kaj esperoj ĝis fina venko.

Plej ofte la manĝoj ne estis pretitaj surloke, sed kunportitaj en specifaj skatoloj. Tiaj tipoj de skatoloj aceteblaj en multaj vendeojoj kaj stacidomoj kaj proponataj al vojaĝantoj.

La distraj vesperoj estis ne-formalaj sed iom improvizitaj, laŭ la preteco de la partoprenantoj, kiuj iom spontane proponis rakontetojn, anekdotojn, amuzojn, kantojn. Aparte ŝatata estis la tajšo-kotoo-muzikaĵo de s-ino Aoyama. Sed la vesperoj finiĝis multe pli poste en amikaj rondoj ĉe bongustaj bieroj kaj sakeoj, kun manĝaĵetoj, kiuj subite aperis sur la tablo kaj agrabligis la etoson.

Iuj partoprenantoj interesigis pri la prelego "Esperanto en komputiloj", kiun mi prezenti. Kaj mirakle eĉ japanaj komputiloj (kun Vindozi XP) plene akceptis la instaladon de la programoj **EK** kaj **Elitero**. Tio plezurigis ne nur la ĉeestantojn sed ankaŭ la preleganton.

En la unua vespero estis proponita vizito komunan banejon en iom proksima ferio-centro. Tiaj banejoj estas plej ofte apartaj por viroj kaj virinoj. En Japanio estas kutimo sin lavi ekster la banejo, ĉe apartaj lavejo-dušejoj. Poste oni eniras la diversajn banejojn por ĝui la varman akvon (35 ĝis 45 gradoj).

La somero en Japanio estis ĉi-jare tre varma, la temperaturo estis inter 25-30 ĝis 39 gradoj, kaj la klimato estas tre humida, tial multaj japanoj sopiras al montara loko kun malpli altaj temperaturoj fore de svarmantaj grandurboj.



Dum promenado, la enirejo de muzeo pri kaligrafio.

Jacugatake allogas multajn turistojn kaj la Esperanto-Domo troviĝas tie oportune en agrabla verda naturo. Sed bedaŭrinde pluvaj nubo malhelpis admirri la montaron en la ĉirkaŭaĵo dum iu matena ekskurso.

Dum "Nur Esperanto Kunvivado" esti farita rekomendo uzi nur Esperanton dum la tuta kunvivado. Plej multaj partoprenantoj diligente respektis tion. Bedaŭrinde ĉe la oficiala fino de la aranĝo ankaŭ finiĝis tiu "promeso" kaj krokodiloj .....invadis la domon. Sed antaŭ nia foriro jam alvenis al la domo nova grupo da esperantistoj, kiuj tre serioze studis la lingvon kaj kun kiuj ni iom konatiĝis.

Restas agrablaj rememoroj pri tiuj simpatiaj tagoj pasigitaj en la Esperanto-Domo, kie ni estis varme akceptataj dank'al la klopoj de s-ro Išikaŭa kaj ĝuis simpatian etoson.



S-ino Judita havis la malfacilan taskon prijuigi la paroladon de ĉiuj inter-venantoj. Si tre kompetente faris komentojn pri la enhavo kaj la temo, kaj diplomate aldonis kuraĝigajn vortojn.

La manĝo-skatoloj enhavis simplan sed bongustan japanan manĝon.



André Grossmann

La partoprenantoj de la Kunvivado.

Dum la Kongreso en Pekino dejoris multaj junaj studentoj. Dum kunveno la direktoro de la Universitato de Xi'an klarigas al la publiko siajn celojn kaj la ĉeeston de tiuj studentoj.



En Ĉinio estas pli ol 1300 privataj universitatoj kun proksimume 2 ĝis 3 milionoj da studentoj. En la privata universitato de Xi'an (si-an) studas 36000 studentoj. Ĝi ricevis apartan subtenon de la direktoro s-ro Ding Zu Yi, kiu fakte ne estas esperantisto. En la Traduka Instituto la studentoj lernas la anglan, la germanan kaj la japanajn lingvojn kaj krome informadikon kaj aliajn fakojn. En la lastaj 3 monatoj 100 el tiuj studentoj lernis intensive Esperanton. Inter ili 30 estis elektitaj por vojaĝi al Pekino por partopreni la kongreson kaj tie deĵori. Kelkaj jam bone parolas Esperanton.

Generale la privataj universitatoj estas malfortaj kompare kun la ŝtataj kaj estas iom malestimataj, sed la direktoro esperas, ke la privata universitato de Xi'an pli kaj pli famiĝos. La edukado en ĝi estas severa. En 18 jaroj 32000 studentoj diplomiĝis. Ili laboras plej parte en eksterlandaj kompanioj, bankoj, en Singapuro.

La Esperanto-instruisto estas s-ro Wan Shi Rong, kiu dum multaj jaroj laboris en la redakcio de "El Popola Ĉinio". Sed la direktoro planas, ke la studentoj, kiuj nun intensive lernas la internacian lingvon, poste instruoj Esperanton al ĉiuj studentoj de la Universitato.

Prelegas s-ro Ding Zu Yi, la direktoro de la universitato de Xi'an kaj s-ro Wang Shi Rong tradukas al Esperanto.



Studentoj de Xi'an-universitato kaj ilia bonveniga balon-ŝildo antaŭ la kongresejo.



#### Miaj impresoj pri Ĉinio:

Ĉinio estas plene progresanta lando. Grandaj modernaj plur-etaĝaj hoteloj ĉirkaŭas la kongres-centron. La aŭto-ŝoseoj estas modernaj, sed la trafiko estas iom kaosa, sen respekto de prioritato. Multaj gardistoj deĵoras ĉe la hoteloj, ĉe enriroj de kvartaloj, sur la stratoj. Ankaŭ en la hoteloj, en la vendejoj, restoracioj troviĝas multaj deĵorantoj. Mi povis viziti domon, kie maljunuloj agrable aktivas, per diversaj societaj ludoj, dancoj, tablo-teniso, ktp. Sed ankaŭ eblas vidi tre simplajn restoraciojn, malriĉajn kvartalojn. En la turismaj lokoj la vendistoj iom aroge aliras la turistojn. Plej ofte necesas marĉandi ĝis duon-prezo aŭ eĉ malpli. Jes, grandega lando, kiu plene moderniĝas.

## Alzacanoj en Bretonio.

En la kalendaro de Esperanto-aranĝo ni povas legi:

**14. - 21. aŭgusto 2004 - 8-aj Bretonaj Renkontiĝoj en Plouëzec (Bretonio)**

Kultura aranĝo kun ĉ. 200 partoprenantoj.

Pliaj informoj: Jean-Pierre Ducoyer, 8, Rue de Montauban, FR-35750 Iffendic, Francio, tel:+33-2 99 09 71 92, fakso: +33-2 99 09 71 92

Tiun aranĝon partoprenis en 2004 Bernard Behra. Li tre interese rakontas al ni sian restadon tie.

Post kelkaj regionaj staĝoj en Franc-oriento, Svisio kaj Germanio, kaj partopreno al Eŭrop-Unia Esperanto Kongreso (Verono, Italio, 2002), Universala Kongreso (Gotenburgo, Svedio, 2003), Eŭropa Bunto (Strasburgo, 2004) mi partoprenis al la 8-aj Internaciaj Renkontiĝoj de Pluezek (Bretonio – Francio).

Mi venis ankaŭ al tiuj okazintagoj por revidi miajn bretonajn amikojn, kiujn mi unafoje renkontis en Verono. Inter tiuj ĉi Franjo Provost, kiu ne nur scias bone estri la Bretonan Esperanto-Koruson sed ankaŭ vigligi kaj kuraĝigi ĉiujn personojn, kiujn ŝi renkontas. Dank'al Esperanto kaj al Franjo ni daŭrigas la longtempan tradicion, kiu faras solidajn amikecajn ligojn inter bretonoj kaj alzacanoj.

Kiel ĉiu-jare mi havis multe da laboro en majo ĝis julio kaj la necerteco pri mia libereco pro miaj du grandaj knaboj (fino de studioj, novaj loĝejoj, ktp), faris ke mi ne preparis niajn feriojn. Sed la amo de mia edzino por Bretonio, la ebleco revidi la bretonajn amikojn kaj partopreni al la Pluezkaj Renkontiĝoj decidigis nin lastmomente ferii en Bretonio.

Do ni foriris (mia edzino Odette kaj mia pli junaj filo Timothée) por du semajnoj da ferioj en Bretonio. La unuan semajnon ni vizitis Rennes, Brest, Morlaix kaj fine Saint-Brieuc, kie ni retrovis niajn bretonajn amikojn por agrabla vespermanĝo. Ankoraŭ korajn dankojn por la varma akcepto, la bona etoso kaj interalie la bonegaj mituloj kuiritaj en propra suko. Por la dua semajno ni elektis agrablan hotelon en Paimpol, ĉarma bretona plezur-šipohaveno, ĉar pro nia tro mal-

frua aliĝo al la Renkontiĝoj ni ne plu trovis loĝejojn en Pluezek.

Tiel, ĉiu-matene (dum ses tagoj) mia edzino kaj mia filo kondukis min al la lernejo de Pluezek, kie mi sekvis, kiel obeema knabo, la kurson de S-ro Bill Chapman (el Britio-Kimrio). Temis pri interparolado. Mi elektis tiun kurson ĉar, mi ja preskaŭ bone legas Esperanton, sed mi pli malfacile parolas ĝin. Mi ŝatis la instruadojn de Bill Chapman. Li estas afabla homo kun bonegaj britaj manieroj. Tiu profesoro sciis interesni kaj gardi nian atenton ĉiujn tagojn dum tri horoj. Lia kurso estis divers-speca : kantoj, humor-rakontoj, skeĉoj, multaj debato-temoj, demando-ludoj, ktp...kun la konsanta zorgo partoprenigi la lernantojn. Brave. Mi estis interesita pri tiu kurso, sed eble estis iom tro da partoprenantoj kun kelkaj « facil-interparoladistinoj ». Pro tio mi ne tro aŭdaciis ofte peti la parolon. Sed mi gardas bonan memoron pri tiu kurso kaj pri S-ro Chapman. Dank'al li mi certe denove progresis.

Mi aŭdaciis trapasi la ekzamenon por la Atesto pri Elementa Lernado. Momento de streso ... mi timis ridindigi min, sed finfine post la skriba parto, la parola parto bone okazis.

Dum mi sekvis la kurson aŭ trapasis la ekzamenon, mia edzino kaj mia filo malkovris la regionon. Ĉiutagmeze ili venis preni min por kune tagmanĝi kaj ankoraŭ viziti la regionon. Ni estis tre feliĉaj pri la bela regiono, preĝejoj, krutaj klifoj, ŝipoj, kasteloj (interalie la kastelo de la Roche-Jagu kun ĝiaj belaj ĝardenoj) pejzaĝoj, insuloj, tipaj domoj, ŝip-havenoj, ktp.

## Plouëzec

**170 personnes participent aux 8<sup>e</sup> rencontres espérantistes**



Ni vizitis ankaŭ la ĉarman urbon Tréguier. Mi ne preparis tiun ekskurson per la legado de gvidlibro. Mi estis do agrable surprizita malkovri trabar-domojn, belajn stratojn, la domon de Ernest Renan, la Katedralon Saint-Tugdual (juvelo de la bretona religia arkitekturo - flamgotika stilo), ĝian klostron kaj la tombon de Sankta Yves, sankta patrono de Bretonio kaj de la legistoj. Promenante en tiu urbo, mi meditis pri tia bona hazardo ĉar mi estas juristo : jen ankaŭ ligo inter Bretonio kaj mi. Mi konsentas pri tiu parto de la preĝo al Sankta Yves : « Faru ke ni sciu defendi niajn rajtojn sen damaĝi al la aliuloj, serĉante unue la reamikigón kaj la pac-on. Estigu defendantojn, kiuj pledas favore al la subpremato, por ke la justeco estu farata en amo. » (Fais que nous sachions défendre nos droits sans porter préjudice aux autres, en cherchant avant tout la réconciliation et la paix. Suscite des défenseurs qui plaident la cause de l'opprimé pour que « justice soit rendue dans l'amour. ») Mi pripensas ankorau al Renan, kiu eldonis verkojn skandal-juĝitajn, ĉar ili rekondis racian kaj kritikan kristanismon. Mi trovis interesa la kontraston inter la tradicio (katedralo + Sankta Yves) kaj la modernismo (Renan). Mi faris tiun instruon al mi : bone estas koni la tradicion kaj la historion, sed ni devas ofte ekzameni niajn kredojn kaj opiniojn tra la lumo de la racio kaj de la kritiko per si mem certe, kaj ankaŭ helpe de la pensuloj, speciale de tiuj, kiuj kuraĝis pensi kaj skribi libere kaj alimaniere.

Ĉiuj tagojn de la semajno mi ŝatis la bonegan librosvoron. Oni povis elekti kaj aĉeti esperanto-librojn en bonega stato (eble vi jam renkontis librosvorojn, kiuj ŝajnis brokantejo !) kaj ricevi kompetentajn konsilojn.

Ĉiuj vesperoj estis agrable organizitaj : prelegoj, bretonaj dancoj, ludoj, maristaj kantoj, teatraĵoj, ktp. La neesperantistaj loĝantoj de Pluezek partoprenis volente al niaj vesperoj. Tio ĉi estas bona ideo, tiel oni vidas kion faras la esperantistoj kaj ĝui nian bonan etoson. Ni ŝatis la prelegon de Zef Jegard, kies libron ni jam legis. Li estas simpatiega kaj fama esperantisto kaj biciklisto. Li parolis al ni pri « Mia biciklado ĉirkaŭ la mondo ». Lia lasta vojaĝo celis atingi bicikle en du monatoj Ifiniac (Bretonio) al Vladivostoko (ekstremorienta Rusio). Malgraŭ tiu nova vera heroajo Zef Jegard restas modesta kaj afabla homo. Li faris tion, por ke oni parolu pri Esperanto. Pri la bretonaj dancoj, mi malkovris, ke ili estas facile lerneblaj kiel Esperanto. Oni nur bezonas multe da tempo se oni estas stulta kiel mi. Alia konstanto: la ĉinoj havas pli bonajn kapablecojn por lerni la bretonajn dancojn ol la alzacanoj.

Laŭ la tradicio, la lasta vespero estis la Adiaŭa Vespero. Oni prezenti kantojn kaj teatraĵojn preparatajn dum la semajno. Mi denove miris pro la granda kapabla, sed kun speciala mencio por la bretonaj esperantistoj, de nia komunumo por organizi altkvalitajn agrablajn spektaklojn sen pretendoj sed laŭ koro (oni faris tion por la amo kaj la pasio). Dankojn al vi ĉiuj karaj bretonoj kaj partoprenintoj, ĉar per la emocioj kaj la ridoj ni faris « unu grandan rondon familian ».

Ni bone revenis hejmen plej riĉaj kaj « feliĉa kiu, kiel Uliso faris belan vojaĝon ». Ni revenos en Bretonion.

Bernard Behra

Mi memoras ke mi devis lerni parkere tiun poezion en elementa lernejo. Mi havis multe da malfacilaĵoj por lerni ne nur la poezion, sed ankaŭ la restajon. Mi parkerigis nur la unuan verson ! "La douceur angevine" (alia plurvorta esprimo) estis por mi ĉefe la plezuro de la fino de la teda lerno, sed mi neniam alvenis parkere ĝis tia "douceur angevine". Estis nur espero. Mi estas nun sen malpardonemo, temas nur pri nostalgio.

Bernard Behra

Evidente mi serĉis la esperantan tradukon de tiu soneto. Kie ? Kiel ? Unue, en mia esperanta biblioteko : ĝi ankorau ne estas sufice kompleta. Due, helpe de Interreto serĉilo : mi nenion trovis. Tri, per retmesaĝo al la samideanoj : sen respondo. Kvare, mesaĝon al ufermembroj@yahoo-groupes.fr : S-ino Jocelyne Monneret skribis al mi ke ŝi perdis la tekston, sed ke mi povas peti ĝin poste ĉe du francaj samideanoj (S-roj A. Bartin aŭ Ch. Gasse). Si sciigis ankaŭ al mi ke okaze de inaŭguro de placo "Esperanto" en Liré (Francio), naskiĝvilaĝo de Joachim du Bellay, tiuj samideanoj disdonis la poemon. Kvine, mi rigardis en la elektronika katalogo "Trovanto", ĉe <http://www.onb.ac.at/sammlung/plansprochen/index.htm> : kaj mi trovis : <Du Bellay, Joachim ; <Felicha sarto ; Felicha estas / Joachim Du Bellay <En : Tutmonda sonoro / Hrsg.: Kalocsay, Kalmán = Kalocsay, <Kolomano = Kolochajo, Kolomano = Peneter, Peter <pseud.>; p.312, vol. 1 <dokumentnumero: 708.376-B. Esp-17

## HEUREUX, COMME ULYSSE

Heureux qui, comme Ulysse, a fait un beau voyage,  
Ou comme celui-là qui conquit la toison,  
Et puis est retourné, plein d'usage et raison,  
Vivre entre ses parents le reste de son âge !

Quand reverrai-je, hélas, de mon petit village  
Fumer la cheminée, et en quelle saison  
Reverrai-je le clos de ma pauvre maison,  
Qui m'est une province et beaucoup davantage ?

Plus me plaît le séjour qu'ont bâti mes aieux  
Que des palais romains le front audacieux,  
Plus que le marbre dur me plaît l'ardoise fine,

Plus mon Loire gaulois que le Tibre latin,  
Plus mon petit Liré que mont Palatin,  
Et plus que l'air marin la douceur angevine.

## \* FELIÇA SORTO

Feliçā sarto, kiel Ulisses multvojaĝa,  
aŭ kiel konkerinto de la ŝafano ora,  
reveni fine hejmen, kaj dum vivreste glora  
inter parencoj vivi pli sperta, kaj pli saĝa.

Ve, kiam fumon vian, kameno hejmvílaĝa,  
mi vidos gaje fumi, en kiu tempo fora  
mi vidos vin, dometo, kaj karto, pli valoro  
al mi ol tutu rega provinco riĉpejzaĝa?

Pli plaĉas al mi nia prapatra domo pacia,  
ol de palacoj Romaj la frunto plej aŭdaca,  
pli ol marmoro dura l'ardezo fajne blua,  
pli mia Loire galla, ol la Tiber' latina  
pli mia Liré eta, ol Monto Palatina,  
pli ol marvento sala, la dolĉa mild' Anjua.

## Neforgeseblaj renkontoj en Budapešto

La 17an de julio, je la sepa matene, du aŭtomobiloj startas el *Gérardmer* en la direkto al *Budapešto*. Interne, sep vogeza j geesperantistoj.

Kial tiu longa vojaĝo?... La pasintan jaron, okaze de ŝia restado en *Le Tholy*, nia fidela rumana amikino *Lenke* proponis rendevuon en tiu historioriĉa ĉefurbo, kie loĝas ŝia filino.

Kaj ek de tiu decido, esperantista solidareco plenvivis. Dank' al la libreto "Adresaro de SAT", ni antaue kontaktis tute nekonatan esperantistinon en *LINZ* (Aŭstrio), kiu tre afable rezervis nianome dormoĉambrojn en la komforta hotelo "Zur Lokomotive". Tie, dekduo da samideanoj atendis nin! Ili tuj alproponis al ni viziton de urboparto per tramo kaj kablotrajno (...sen kablo, ni rimarkis!), per kiu ni supreniris sur faman monteton... De tie, je la subiro, *Linz* kaj ĝia *Danubo* oferis al ni ĉiuj mirindan panoramon. Forkurante, ni sukcesis eviti fortegan fulmotondron kaj ni vivis komunan vespermanĝon. Manette deziris kanti en esperanto, sed « *ne estus dece en altnivela restoracio* » oni diris al ni.

Dankon al la grupo de *Linz*, al *Greta* kaj al ŝia impete vigla fratino, kiu amike akceptis nin.

Per detala kaj preciza mapo, ŝajnis al ni facile malkovri nian hotelon *Fabius* en Budapešto.



En Francio, ĉiuj konas *Fabius-on*!... Ne en Hungario! Dum unu horo, ni vagis, trapasis ponton, ne retrovis vojon... por retrapasi la ponton! Malgraŭ ni aj verdaj steloj, ni ne renkontis samideanojn. Ho ve!... ne ĉiuj ankoraŭ parolas esperanton... Fine, montrante nian mapon, dank' al multaj gestoj, ĉarma Hungarino klarigis al ni, kiel fari por trovi nian simpatian hotelon, kie *Lenke* senpacience atendis nin.

Ni ne alpriskribos vin ĉiujn belegajn monumentojn, iluminitajn avenuojn, modernajn vendeojojn, kastelojn, muzeojn... de tiu grandioza ĉefurbo; vi trovos tion en gvidlibroj! Ni ne parolos pri la impona piroteknikaĵo, kiu, okaze de nacia festo, rivas ĉiujare unu milionon da spektantoj. Ni multe vizitis, ni multe piediris.

Kvartaloj kun luksaj bankoj, riĉaj restoracioj kontrastas kun aliaj, kie rubaĵoj diskovras la grundon... kaj jam kiel en Francio, pentr-art-aĉo (*tags*) makulas multajn murojn eĉ frēsdate refarbitajn.

Sed precipe ni aprecis la atentindan helpon, la estimindan sindonemon de nia rumana amikino. Hungario devena, ŝi kompreneble flue parolas la hungaran. Ŝi helpis nin por aĉeti tram-biletojn; ĉar ni estas emeritoj, ŝi malpliigis la prezon de enirbiletoj en muzeojn, sinagogon, ktp.

Sed aliaj surprizoj atendis nin... *Ilona*, leterkorespondantino de *Michèle* (ili neniam renkontiĝis!) veturis per buso el Rumanio - 450 km-ojn! - por vivi nur unu duan tagon kun sia franca amikino. Nepriskribbebla emocio! *Kalman*, korespondanto de *Jean*, alvenis akompanata de sia junaj edzino kaj de la bebo... Ili veturis 220 kilometrojn! Komuna tagmanĝo, promenado dur *Margit-insulo*, interŝanĝo de donacoj, kaj multe, multe da amikeco. Kortuŝaj estis tiuj momentoj plenplenaj de profunda kaj sincera emocio.

Kiam alproksimiĝis la adiaŭoj, estis malfacile kaŝi larmojn...

Pri tiu neforgesebla semajno en Budapešto, certe ni ankoraŭ longtempe parolos. En nia kapo bildoj denove dancos. Ni memoros pri multaj belaĵoj, pri la pejzaĝo ĉirkaŭ *Balaton-lago*, sed ni ĉefe revivos tiun eblecon paroli, komunikii kaj profundie senti la amon de la alia en senlima frateco.

Dankon al ĉiuj kaj, sendube, al Esperanto!



*Robert kaj Guitou COLIN  
La grupon fotis Jean-Paul LAMBERT*





... Je la fundo de la valo, ni jam ekvidis la urbeton *Saugues*. Subite, rande de la vojo, stranga, alta skulptadejo pikis nian scivolemon... Halto...

Niaj legantoj bonvolu sekvi nin sur la spurojn de la tiel nomata "*Bête du Gévaudan*" (*Besto de l' Jevodan*) ...

Dum la dua parto de la 18a jarcento ia fabela besto terurigis la loĝantaron de la regiono Gévaudan, nuntempe departemento *Lozère*. Taksita kreaĵo de l' diablo kaj kvazaŭ nevundebla, ĝi estis ĉaspelita de vilaĝaj ekspedicioj kaj poste de oficialaj ĉasesploroj, tio dum tri jaroj... sen rezultoj.

La afero komencis la 30an de junio 1764, kiam oni malkovris la kadavron de 14-aĝa ŝafistino, *Jeanne Boulet*, tutcerte agresita taglume de besto simila al enorma lupo, sed laŭ unuaj diraĵoj, kun pli dikaj kaj pli akrepintaj kapo, kun eksternorma faŭko kaj dikaj harkovrita vosto.

Post tiu malkovro sekvis sanga buĉado, dum kio pereis pli ol cent homoj!

Pli kaj pli multiĝis la atakoj far la „monstro”. Ĉiuj viktimoj elmontris hororajn vundojn: ŝirita ventro, kap-haŭto forigita, fojfoje tranĉitaj kapoj kuſiſ apude... Memeweidente tiuj eventoj nutris multajn raportojn kaj la „rumoro” atingis la orelojn de la reĝo *Ludovika la dekkvinjara*. Li komisiis siajn „*Dragonojn*” organizi ĉasesplorojn... Monsumo je 9400 pundoj estis eĉ promesita, en la kazo se sukcesus la kapto de la „besto”. Sed ĝi restis nekaptebla kaj dekoj da korpoj estis daŭre malkovritaj en ofte malfacile traireblaj veproj. La raraj ĉasistoj, kiuj pretendis esti vundintaj la kreojn, rakontis ke ĝi falis grunden sed ĉiufoje tuj restariĝis antaŭ malaperis. Jes, tiam disvolviĝis opinio, laŭ kiu „la Diablo” kaſigis ene!

Laŭ unua popola kredo, temis pri atakoj de izolitaj lupoj, sed tiu tezo -ankoraŭ hodiaŭ pridedefendata de „serĉantoj”- estis neprobabla, ĉar tiuj lupoj tre malofte agresas homojn, nur se ili suferas grandan malsaton. Plue, malfacilas imagi, ke lupo povus senkapigi sian viktimon! Rimarkiĝis baldaŭ, ke la aluditaj viktimoj neniam estis pli ol 18 jara-aĝaj... Cetere preskaŭ ĉiuj elvenis el katolikaj familioj, en regiono kie tre gravis streĉiteco inter tiuj kredantoj kaj la protestantoj - „*Hugenotoj*”- ... tiam tre eta minoritato.

Nu, post 250 jaroj persistas la mistero!

PS – Abundas multfaceta bibliografio pri la afero, eĉ kompakt-diskoj! Se vi intencas turismi somere en la regiono, vi eĉ povos partopreni en „fakaj piedmigradoj”, viziti specifajn muzeojn...

La scivolemuloj simple tajpu „*bête du gévaudan*” ĉe la serĉilo „google” kaj ili ricevos pli malpli ekskitajn TTT-paĝojn!



### Sport-trejnado... kaj seminario !

Vere naiva ideo supozis, ke atingi *Švaben Jurason* en Germanio -je ĉirkaŭ 300 kilometroj de *Metz* en Francio- estus veturbagatelajo... Kial ne antaŭe pripensi, ke ĉiu vendredon migras granda parto de la regiona popolo cele finsemajn-ferion en “facile atingebla” loko, kaj ke manko de surkamparaj multnombraj stratoj kiel en Francio, devigas uzi preskaŭ ekskluzive la allogajn (?) aŭtovojejegojn...

Imagu nur... Nia “heliketo” -kial diable dediĉis ni tiun kromnomon al nia domveturilo? - bezonis preskaŭ ok horojn por finfine halti, je la naŭa vespero, tra densa nebularo, sur la parkejo *“Hörnle”*... Plue, punktaj survojaj akcidentoj bremsis la seninterrompan aŭto-fluon, kiu estis forpusita sur unikan ŝoseon... Feliĉe, ĉe la stirilo de la domveturilo, eksterordinare paciena kaj atentema virino !

Teorie -kaj praktike!- romantika pado (?) ebligas aliri la kastelon *Teck* ek de la aludita parkejo... nur en kvaronhoro, laŭ aserto de la staĝ-aligilo!... Prudente, post vana serĉo helpe de poŝlampo, kiu apenaŭ traboris unu metron da nebulo, ni decidis tranokti surloke...

Ĉu malkasi, ke la morgaŭan frumatemon, ni konstatis, ke la elvokita promen-vojeto iĝas faktaj sport-itineroj, kiun ni nepre devas engluti por meriti la sopiratan maten-mangon, kiu atendis nin, post... du kvaronhoroj da higien-piedirado! Rekompencis nin agrabla kaj varma etoso, kaj tradicia germana matenmanĝo, kiu satigis nian stomakon! Eta surprizo : nur naŭ francaj “seminariantoj”...

Jen kelkaj petaloj de la tiel nomata “bukedo”, kiun ni ĝuis : tre altnivelala prelego de *Andreas Emmerich*, GEA-prezidanto, kiu provis, helpe de iom “baza” teknika instalajo, inici la ĉeestantojn pri ekonomiko parte ligata al la esperanto-movado. Ĉu vi jam aŭdis pri la verko “*Bapto de Caro Vladimir*”?... Dank’ al *Michael Scherm* ni konatigis kun tiu fama satira poemo, cetere humure ilustrita!

Jen malkovro de la Danubo-delta kaj ties ekologiaj problemoj, pensige atentigitaj far *Manfred Westermayer*...

